7-a JARO, N-o 336

LEIPZIG, 12. / 3. 1931

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

## KION MI NE KOMPRENAS

Bone mi komprenas, ke kapitalistoj defendas siajn interesojn k kontraŭstaras laboristajn atakojn, ĉar nia venko ja signifus detruon de iliaj fiprivilegioj. Memkomprenebla estas la klasbatalo de l' proletaro por siaj rifuzitaj de kapitalistoj rajtoj, kiun staton la nuna mondordo ja nepre kaŭzas. Sed ekster tiuj klaraj aperaĵoj ni ofte povas konstati, ke burĝdevenaj homoj agadas ĉe la laboristara flanko k inverse senposeduloj enviciĝas en la burĝtendenca armeo. Kiaj kialoj klarigas tiun spiritan intermikson?

Burĝoj, subtenantaj la proletaran aferon, ĝenerale estas bonkoruloj, pacemuloj, idealistoj. Ili volas prepari al la homaro pli feliĉan estonton k ĝuste taksas, ke tio nur eblas sub la standardo de l' socialismo. Aliflanke proletoj, starantaj en burĝa tendaro, malhelpas k prokrastigas la alsocialisman evoluon. Ambaŭ partoj ja reprezentas esceptojn, ĉar pro akriĝo de la klasaj diferencoj pli k pli tiel burĝoj kiel laboristoj ekkonas vojon k direkton de sia klaso. Malmultuloj agas kontraŭ propraj interesoj, la unuj pro idealismo, la aliaj pro — stulto.

Certe neproletoj, turniĝantaj al nia flanko, scias pri la per tio kaŭzata malutilo por sia klaso. Tiaj esceptuloj intence rezignas je siaj klasaj privilegioj k honeste celas la detruon de l' nuna sociordo, esperante, ke la socialisma regado pli juste dividos ĉiuhoman bonstaton k feliĉon.

Sed la proletoj, kiuj transiĝas al la klasa malamiko — ĉu pri ties sinteno ankaŭ ekzistas klerigeblo? Ofte oni povas konstati, ke egoismo estas la kaŭzo de l' perfido aŭ mizerego devigas proletojn, pro avantaĝoj k monhelpoj aliĝi kontraŭulojn. Ankaŭ malespero, dubemo k malfiero fantomas en proletaj kapoj. Kelkaj prave-neprave malkontentas pri la persona konduto de laboristaj gvidantoj. El tiu rezervujo la kapitalismo laŭbezone ĉerpas helpantojn por siaj kontraŭlaboristaj atencoj. Se okazas kunpuŝiĝoj inter diverspartianoj, ĉiam proletoj batas kontraŭ proletoj, dum la kapitalistaj ordonantoj malantaŭe ridante profitas. Se la ekspluatantoj mem devus batali, la situacio tuj aspektus alia. Sed tio malnecesas, ĉar facile oni dungas anstataŭantojn — k la stultaj proletoj



bategas k eĉ mortigas sin reciproke por kapitalistaj interesoj.

Oni povas kompreni, ke senlaborulo eble ne rifuzas fiproponon de faŝisma organizo, ĝin aliĝi, se li poste ricevas laboron k per tio panon por siaj malsatantaj infanoj. Ni nur devas imagi nin en staton de tia mizerulo, antaŭ ol ni nomas lin perfidulo. Kiu okupas bone salajratan postenon kiel partifunkciulo, tiu facile povas kondamni tiajn renegatojn.

Sed ankaŭ ekzistas aliaj proletoj, kiuj libervole kiel "kristanaj" aŭ "naciaj" laboristoj staras en la kapitalisma fronto, kiuj neas la klasbatalon, ne sciante, kiom ili per tio domaĝas al la proleta movado k prokrastas ties venkon. Necesas ankoraŭ renverso de la proletara spiritostato. Multaj opinias, sukcesi amike intertrakti kun kapitalistoj. Multaj nur serĉas avantaĝojn, ĉiam pretaj, malprofitigi siajn laborfratojn. Se ili kuniĝante almenaŭ spirite kontraŭstarus la kapitalismon, nia celo jam estus proksima. Se ni volus, ni jam hodiaŭ venkus. Nia komuna indigno momente forbalaus la tutan kapitalisman regaĉon. Sed anstataŭe trotoleremaj proletoj furioze interbataladas k parte interamikiĝas kun ekspluatantoj k la stultiganta eklezio. Tio estas, kion mi neniam komprenas . . . *F. S. (16 462).*

---

## La 13-jara "sendependeco" de Litovio

Sendependiĝinto

La 16-an de februaro festis la litovia faŝismo la 13-an datrevenon de l' litovia "sendependeco". La litova popolo, kiu estis subpremata dum jarcentoj de la pola nobelaro, de la rusaj grandbienuloj k ĝendarmoj, retrovis sian memstarecon dank' al la Oktobra revolucio en Rusio, kun ĝiaj devizoj pri memdifin-rajto de l' nacioj.

La 13 jaroj da litovia "sendependeco" estis plenaj je turmentado k mortigado al la plej bonaj proletoj-revoluciuloj. En 1918 la litova burĝaro mortpafigis centojn da laboristoj; en 1919 ĝi neniigis la proletajn sovetojn en Panevezis k Ukmerge; en 1921 ĝi sufokis revolucian soldat-ribelon en Panemune. En 1922 la politika polico arestis centojn da kamparanoj en Rakiŝĉi, kiuj volis krei kultur-organizon, k terure torturis ilin.

En 1924 oni arestis junulinon (Marite) pro disdonado de flugfolioj. Ŝi freneziĝis pro kruelaj torturoj aplikitaj kontraŭ ŝin. Fine de 1924 oni mortkondamnis tri laboristojn pro disdono de komunistaj broŝuroj; en 1925 la reakciuloj mortpafis la soldaton Abeles pro partopreno je revenĝo kontraŭ provokisto. En 1926 la registaro kristan-demokrata estis devigata cedi, sub

la premo de l' laboristoj-kamparanoj, al liberal-socialista registaro. Dum mallonga periodo la laboristoj sukcesis formi fortajn organizojn.

Pretekste, ke la komunistoj preparis ŝtatrenverson, oficira bando, iamaj caraj lakeoj, faris faŝistan ŝtatrenverson la 17-an de decembro 1926, dispelis la parlamenton k proklamis la faŝiston Smetona prezidanto. La unua ago estis malpermesi la organizojn k gazetojn proletajn k enkarcerigi centojn da laboristoj en malliberejoj k koncentro-tendaroj. Kvar komunistoj de l' Centra Komitato estis mortpafataj. Komence de 1927 estis ekzekutata revolucia laboristo Melamed. En aŭgusto 1927 estis sange subpremata laborist-kamparana ribelo en Taŭrig. Centoj da laboristoj k kamparanoj estis ekzekutataj sen juĝo. En 1928, 15 enkarcerigitaj laboristoj estis mortkondamnataj, ĉar ili festis la 1-an de majo en koncentro-tendaro.

En 1929 kvar laboristoj, ĉe kiuj oni malkovris sekret-presilaron, estis same mortkondamnataj. Nuntempe en la malgranda Litovio "vivas" pli ol 500 politikaj malliberuloj en treege mizeraj kondiĉoj: kun malfreŝa nutrajo, en pesta aero, sen lumo k hejto, sen libroj nek ĵurnaloj, sen eblo ricevi vizitojn.

Jen la bilanco de 13 jaroj da litovia "sendependeco".

# LA EKONOMIA KRIZO K LA LABORISTARO

## laŭ la situacio germania

(A. H. 13885).

La laboristaro ankoraŭ multe devas lerni de la kapitalistoj por povi realigi sian liberiĝon sopiritan. Malpli da laŭtaj paroloj, malpli da akraj devizoj, k despli da aktiveco k praktika laboro por la laboristaj interesoj estas necesa. La kapitalistoj ne *krias:* "Kapitalistoj de la mondo unuiĝu!", sed ili *faras* tion senbrue per fondo de internaciaj trustoj, sindikatoj ktp. La proletoj sin ebriigas per devizo: "Proletoj ĉiulandaj unuiĝu!", sed fakte ili eĉ en propraj landoj ne kapablas starigi unuecan fronton. Tiom pli oni emfaze pritraktas la temon per teoria babilado ĉe laboristaj festoj k kunvenoj.

Dum la postmilita revolucia tempo la kapitalistoj de la venkintaj ŝtatoj akceptis la postulojn k kondiĉojn de la laboristaro, kies gvidantoj intertraktadis kun la mastroj, lasante al ili la ekonomian superregadon k mem kontentiĝante pri donitaj promesoj leĝe garantiataj — laŭŝajne. La posta evoluo estas frapa pruvo, ke la laboristaro atingas sian liberiĝon neniam per paca interkonsento kun kapitalistoj, sed nur per senresta ekstermo de iliaj privilegioj. Tuj post la refirmigo de la ŝanceliĝa pozicio de l' mastroj, ili rekompencis la konfidemon de la laboristoj per kapitalista agmaniero. La akiritaj sociaj leĝoj restis, sed pli por la profito de la mastroj ol por utilo de la laboristoj. Paradoksa aserto? Prijuĝu mem.

Por eviti la ŝarĝojn de la laŭleĝe per tarifo fiksitaj salajroj la mastroj forpelis la maljunajn laboristojn relative altpagatajn k anstataŭe dungis junulojn k precipe virinojn ricevantajn ridindajn salajrojn. "Ni ja devas pagi por la senlabora k invalida asekuro, ni do bonrajte povas maldungi la malfortigitajn k tamen plej alte salajritajn maljunajn laboristojn, ankoraŭ plue subtenatajn per nia mono fare de la ŝtato!" Tiele la mastroj kutime pravigas sian senskrupulan sintenon. Plie la kapitalistoj kutimiĝis anstataŭigi la homojn plejeble per maŝinoj ne pretendantaj la tiom tedan ŝtatan protekton. Tiun metodon oni nomis simple "raciigo", kvankam laŭ kapitalistaj konfesoj mem per tio ofte estiĝis pli grandaj kostoj ol per la elspezoj por la salajroj de la maldungitaj laboristo. Ĉu mirinde, ke granda parto de la laboristaro mem estas malkontenta pri tiaj danĝeraj donacoj sociaj?

La kapitalistoj fakte sukcesis per ruzo falsi k senefikigi la esencon de la sociaj akiroj. La mastroj kredante la laboristojn timigatajn k genufalantajn pro mizero, nun ankaŭ signalas senkaŝan disbaton al la formo de porlaboristaj leĝoj. Ja ili rikane kulpigis tiajn leĝojn esti kaŭzoj de la senlaboreco per la kapitalistoj mem metode kreita. Dume la kapitalistoj rigore subfosadis la fundamenton de la laboristaj rajtoj ĝis nuna stato de komenciĝanta disfalo; la laboristaj instancoj respondecaj aŭdigis flamajn protestojn k rezoluciojn, sed ne sekvis efika kontraŭago.

La plimulto de la laboristaro, konscie rekonante la pli fortan potencon de la mastroj kompare al la laborsindikatoj cedemaj, perdis la konfidon al la propraj gvidinstancoj. Por ne devi sidiĝi inter du seĝoj, la simpla laboristo denove adaptiĝis al la mastra volo por povi almenaŭ vivi. De tio rezultas la indiferento rilate al laboristaj sindikatoj.

Nur laborista unuiĝo, kiu pruvas sufiĉe da rezistemo por rompi la kapitalistan arogon, reakiros la subtenon de la laboristaro. Por supervenki la kapitalistan sistemon necesas pli da agoj k malpli da vortaj protestoj.

# Grenfabrikoj en socialisma konstruado

(Fino. Vidu antaŭan n-on.)

En grenfabrikoj por semado oni uzas purigitajn selektitajn specojn da grensemo, kontraŭstaranta al seko. Vaste estas aplikataj ĉiaspecaj rimedoj por batalo kontraŭ malutilaj insektoj. Ĉio ĉi devas plej efike pligrandigi rikolton sur kampoj de grenfabrikoj. La grenfabrikoj rikoltas el hektaro 1½-oble pli ol meza kamparanmastrumo. Per plua disvastigado de tekniko, la rikoltokvanto ankoraŭ pligrandiĝas.

Nuntempe ĉe konstanta laboro en grenfabrikoj estas okupitaj 20 000 kamplaboristoj k oficistoj, el kiuj 7 700 estas traktoristoj, ŝoforoj k riparlaboristoj. Por ĉiuj laboristoj en la sovĥozoj estas fiksita la okhora labortago. La supernorma laboro en kamparo estas pagata aparte.

La vivkondiĉoj de l' laboristoj en grenfabrikoj kun ĉiu jaro pliboniĝas. En grandegaj sovĥozoj jam komence de aŭtuno 1929 estis konstruataj bone instalitaj loĝejoj por laboristoj, estis organizataj manĝejoj, k en kelkaj sovĥozoj estas instalitaj lernejoj k malsanulejoj.

La socian laboron en grenfabrikoj oni arangas same kiel en industriaj entreprenoj. La sindikata laboro estas plenumata en laboristaj komitatoj. Per fabrikaj komisionoj k kunvenoj laboristoj larĝe partoprenas la organizadon de la mastrumo: ili priparolas laborplanojn de la mastrumo, solvas problemojn, kiel pligrandigi la rikoltintenson, kiel plej bone aranĝi la produktadon ktp.

Unu el la gravaj k seriozaj malfaciloj, kiun devas venki la registaro, estas la manko de bone instruitaj laboristoj por la grensovĥozoj. En la jaro 1931 ni devas havi en grensovĥozoj ne malpli ol 40 mil konstantajn laboristojn k inter ili 20—25 mil traktoristojn. Antaŭe en Rusio ne ekzistis tiaj grandaj meĥanikigitaj mastrumoj. Malriĉuloj k kamplaboristoj neniam laboris per traktoroj, "kombinoj" k kunmetitaj maŝinoj, tirataj per traktoro. Al ili estas malfacile lerni tiun ĉi laboron. Tio estas kaŭzo, kial ofte oni rompas traktorojn k maŝinojn.

Laboristoj por grenfabrikoj — traktoristoj k "kombin"istoj — studas en kursoj. Sed por scipovi bone labori, oni devas havi ankaŭ bonan praktikon. Tial estas bezone, ke ĉiuj laboristoj laboru plej diligente. Necesas pruvi, ke la sovetiaj laboristoj povas labori

per maŝinoj sambone, kiel laboristoj en kapitalistaj landoj.

Gravegan malhelpon spertas la sovĥozoj (same kiel la fabrikoj) pro migrado de laboristoj k maldiligenta rilato al maŝinoj. Sovĥozaj agronomoj, inĝenieroj k teknikistoj ankoraŭ ne povas sufiĉe bone administri grandan meĥanikigitan mastrumon. Flanke de kulakoj sin kaŝantaj inter oficistoj k laboristoj oni renkontas malhelpantojn, kiuj difektas maŝinojn k kaŭzas malprofiton al la mastrumo, per tio helpante al niaj malamikoj.

Antaŭ Sovetio staras tre granda k decida tasko: prepari novajn fakfunkciulojn por la sovĥozoj — administrantojn, agronomojn, inĝenierojn, teknikistojn k laboristojn.

Sovetiaj grenfabrikoj, laŭ siaj areo k meĥanikigitaj laborprocedoj estas grandega atingaĵo. En tiu rilato ni ne nur atingis, sed jam postlasis la kapitalistajn landojn — eĉ Usonon. Sed ankoraŭ tre multe ni devas laboradi, por atingi Usonon laŭ laborkvalito. Ni devas lerni sambone labori k eĉ pli bone ol usonanoj.

**3. Sovĥozoj — organizantoj de kolektivigo**

La grensovĥozoj per ekzemploj instruas la malriĉulajn amasojn el vilaĝo, kiel ili devas organizi la grandan produktadon k uzi la teknikan ilaron por agrikultura mastrumado. La grensovĥozoj kontraktas kun tutaj distriktoj por kulturi per siaj traktoroj k maŝinoj la kampojn de l' malriĉularo. Per tio ili helpas al ili organiziĝi je kolĥozo. En antaŭa jaro (1929) la grensovĥozoj kulturis ĉ. 50 mil hektarojn da kamparanaj kampoj. En 1930 ili kulturis proks. 150 mil h. por la kolĥozoj. Tiel la grensovĥozoj ĉirkaŭas sin per reto da malgrandaj kolĥozoj, por kiuj ili donas gravan k efikan helpon. Per siaj maŝinoj k traktoroj la grensovĥozoj kulturas la areojn de l' kolĥozoj, en siaj metiejoj riparas ilian agrikulturan maŝinaron k ilaron, helpas ellabori laborplanojn k organizadi la laboron. La grensovĥozoj disponas pri grandaj kulturfortoj: agronomoj inĝenieroj, teknikistoj, medicinistoj. kvalifikitaj laboristoj. En la gvidantaro de l' sovĥozoj estas komunistoj spertaj organizantoj. Tiuj ĉi laborantoj faras grandan socian laboron en la kolĥozoj.

Laŭ la Kvinjarplano estas skizite, ke en fino de l' jaro 1932 la grenfabrikoj liveros al la ŝtato pli ol 1 600 milionojn da kilogramoj da greno. Nun la sovet-registaro pligrandigis sian planon: jam antaŭ la fino de 1931 ili devas liveri duoblan kvanton da greno.



*Alvoko al kolĥoz-kunveno.*

Nun la terspaco rikoltenda en 1930 en sovĥozoj estas pli ol unu miliono da hektaroj. Ĝi estas sepfoje pli granda areo ol la rikoltenda spaco en la j 1929. Kaj en 1931 la rikoltenda spaco ampleksos 4 milionojn da h.

Sovetiaj grenfabrikoj ludas gravan rolon en nia mastrumado. Helpo de lab. urboj por ili estas necesa — Moskva Elektrofabriko, "Amo", "Dinamo", "Falĉilo k Martelo" k aliaj montris bonan ekzemplon pri tia helpo. Ĉiu el supre nomitaj fabrikoj prenis sur sin patronadon al unu grenfabriko en Meza k Malsupra Volg-regiono, sendis tien spertajn laboristojn por oficoj de direktoroj k iliaj anstataŭantoj k 25—30 plej bonajn laboristojn por aliaj laboroj. Tiun ĉi ekzemplon devas sekvi aliaj grandaj fabrikoj en industriaj centroj de Sovetio. Miloj da industri-laboristoj devas veni por labori en la instalitaj sovĥozoj, por ke ni povu rapide k bone finsolvi tiun ĉi taskon.

La fortoj de la laborista klaso estas grandegaj k neelĉerpeblaj. Nur la venkinta proletaro povas kun tia rapido disvolvi socialisman mastrumadon. Kaj ĉiu laboristo k kamparano devas scii k memori la vortojn de K-do Stalin:

"Oni devas konfesi, ke tiajn rapidegajn temporitmojn de disvolviĝo ne konas eĉ la soveta socialismigita grandindustrio, kies evolurapido distingiĝas precipe per granda skalo. Ĉu ne estas klare, ke nia nova granda socialisma agrikulturo — sovĥoza k kolĥoza — havas grandegan estonton, ke ĝi elmontros miraklojn de plikreskado?"

Kompil-tradukis *Ivnickij* E. V. (Simferopol).

Ĉiam ankoraŭ restas

la plej taŭga dokumento por informiĝi funde pri deveno k disvolviĝo de l' nuna situacio en la SAT-movado la

**Protokolaro de la X-a SAT-Kongreso**

en Londono (aŭg. 1930)

*84 dense presitaj paĝoj*
*Specialprezo escepte malalta: 0,50 mk. g.* (sen kromrabato por membroj).

*Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O. 27.*

# LA KLASBATALO TRA LA MONDO

**Lignaĵista striko en Norda Bohemio (Ĉeĥoslovakio)**

Antaŭ kelkaj semajnoj la firmo Fiŝel ("Fischel"), segfabriko kun 700 gelaboristoj, provis malaltigi la salajrojn je 15%. Krome ĝi intencis maldungi 150 lignaĵistojn, komprenéble la plej revoluciemajn. La salajroj tie pagataj estas kompareblaj nur kun tiuj en Slovakio, t. e. la plej mizeraj el la tuta respubliko. La okaze de intertraktado ĉeestanta metiinspektoro konsilis al la lab. reprezentantoj akcepti la diktaĵon. La fabriko estas plej moderne instalita kun plej alte disvolvita raciigo. Produktataj estas seĝoj el kurbligno, eksportataj al ĉiuj mondpartoj. La entreprenisto asertas ne plu povi konkuri pro tro altaj salajroj. Ekz., seĝo kostas 40 kronojn ĉeĥajn; la salajro po peco estas 5,50 kĉ. Se oni dekalkulas la salajr-malaltigon de 15%, la seĝo kostas 39,18 kĉ.; tiel laŭdire ĝi estas konkurkapabla: komento superflua!

Nun la laboristaro senescepte jam strikas kelkajn semajnojn. Plej strange estas ĉi-rilate, ke la ŝtato devas pagi al la strikantoj monsubtenon, ĉar laŭleĝe la laboristo posedas la rajton, en okazo se lia salajro ne atingas la porekzistan minimumon, rifuzi plulabori, k samtempe postuli ŝtatan senlaborulan subtenon laŭ la tielnomata "Genta sistemo"[1]. La atako de l' entreprenisto do ankaŭ ne utilas la sanon de l' ŝtatfinancoj; male la lignaĵista sindikato ŝparas iom da mono. La strik-situacio estas favora; simpatias kun la strikantoj granda parto de l' burĝaro, kiu monsubtenas aŭ prenas al si por nutrado infanojn de strikantoj. Por la laboristoj la mizero estas grandega, ĉar eĉ en tempo de bona negoco ili devis malsati, precipe en tiu ĉi regiono. Do ĉiuj vi, kiuj sidas sur seĝoj signitaj de firmo Fiŝel, sciu, ke ties laboristoj ĉiam nur vivaĉas.

*SAT-ano 8889.*

**Policanoj kontraŭ senlaboruloj en Duks (Dux), Ĉeĥoslovakio**

Kiel en multaj aliaj urboj. en tiu ĉi okcident-bohemia urbeto la senlaboruloj aranĝis protestkunvenon kontraŭ sia pliakriĝanta mizerstato. Survoje urben grupo da ili renkontis ĝendarmojn, kiuj malpermesis al ili iri pluen. Sen ia alia grava motivo la ĝendarmoj pafis k mortigis kvar laboristojn. La plej nova metodo por plimalgrandigi la senlaborul-armeon.

*SAT-ano 8889.*

[1] Pri ĝi aperis artikolo en n-oj 303, 305/6 de "S-ulo". — *Red.*

### Bataloj inter senlaboruloj k policanoj (Germanio)

En Berlin k Lajpcig okazis je la 25-a de februaro gravaj kunpuŝiĝoj inter senlaborul-manifestaciantoj k policanoj. En Berlinaj antaŭurbaj kvartaloj la amaso elrabis plurajn nutraĵ-magazenojn; la policanoj estis bombardataj de el la fenestroj k havis sume 20 vunditojn. La laboristoj havis unu mortigiton k plurajn vunditojn ĉe batalo ĉirkaŭ la ĉefa laborpera oficejo. Pli ol 100 laboristoj estis arestataj. En Lajpcig la policanoj pafis en la amason, kiu ekatakis la urbdomon k mortigis 4 laboristojn, vunditaj estis ĉ. 20.

*M. D. P.*

### El Polio

En Marki, malgranda urbo proksime de Varsovio, senlaboruloj manifestaciantaj kunpuŝiĝis kun policanoj, kiuj lastaj ekpafis kontraŭ la laboristojn. Tri el ĉi tiuj estis grave vunditaj, 15 arestitaj. *K.*

### Senlaboreco en Japanio

Ankaŭ en Japanio suferas kelkaj centmiloj da homoj tute senhelpe pro senlaboreco. La nombro tre rapide kreskas. La Nagasaki-ŝipkonstruejo maldungis lastatempe 187 personojn. La Kobe-ŝipkonstruejo de l' sama firmo, kiu jam antaŭe senokupigis grandan amason da dungitoj, denove senlaborigis 57 laboristojn. Kredeble baldaŭ ĉe la Kure-ŝipkonstruejo de l' Mararmeo perdos sian laboron ĉ. 4000 laboristoj.

*K. O. (en "Revuo Orienta").*

## Ni enkonduku la vivon en lernejo per la presarto

La nuntempa pedagogio vane proklamos la ecojn de la vivanta lernejo — se ĝi daŭrigos sian intencon serĉi la vivon, kie ĝi ne estas. Por ni la nova lernejo ne estas tiu, kiun oni *igas vivi*, sed tiu, al kiu oni *ebligas vivi*.

Kaj ĉu oni ebligas al infanoj vivi, kiam oni altrudas al ili redaktobjektojn ekster la vivo? Gek-doj tion legantaj, vi ĉiuj scias pri tiaj redaktotaskoj mizerege sensubstancaj — ĉar la lernantoj havis nenion por diri k devis "cerbumi k cerbumadi" por tamen skribi kelkajn frazojn. Tial iom post iom ardo bela vin forlasas, k vi diras: "Per la redaktado ni nenion atingas — ĝi estas tro malfacila". Ĉu do vi opinias, ke por skribi en klara lingvo, senigata je poeziaj formoj, ni bezonas geniajn ecojn?



*Infandesegno.*

Vi mem, vi "elektas", aŭ pli bone vi "trudas" al viaj lernantoj redaktobjektojn: sed ĉu vi persone ŝatas skribi pri fakto ia ajn; ĉu ekzemple vi tre ŝatas redakti leteron por Administracio? . . . Ordinare, tiaj redakt-produktaĵoj estas vere mallertegaj, k tio elmontras embarason nian.

Aliflanke, pripensu kiom facile vi skribas leteron al amiko; tiam via plumo rapidas sur la papero k la ideoj formiĝas senpene.

Certe vi komprenis la kialon de tiu komparo: entuziasme oni skribas pri iaj okazintaĵoj aŭ faktoj; k aliaj povas nur enuigi. — Se tiu aserto estas prava por la instruisto, do ĉi multe pli pravas por la lernantoj: tiuj etuloj interesiĝantaj pri ĉio enuiganta nin, ofte ridantaj, kiam ni ne scias pro kio, havantaj unuvorte infanajn entuziasmojn. Kaj ne zorginte la opinion de tiuj infanoj, ni trudus al ili redakt-objektojn *ne travivitajn de ili.* Foje tiuj redakt-objektoj estas elpensataj de maturulo, por maturula menso, do senigitaj je influo sur infanon. Kial do miri, kiam ni ne atingas tiele la sukcesojn esperitajn?

"Kaj tamen, se la lernejo akceptus adaptiĝi al la sperto infaneca, se ĝi akceptus nur pliperfektigi la kvalitojn troviĝantajn jam en tiu sperto — ĝi povus malproksimen iri." (de F. Djubŭa [Dubois], en "La Bariloj".)

Malĝoje ni konstatas, ke la nunaj pedagogiaj metodoj tro koncentrigas la

## Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin

(el la Petropaŭla fortikaĵo al caro Nikolao la I.)

*A. S. (10 580)*

(Fino. Vidu n-ojn 332, 333, 335)

En la germana eldono (de la Konfeso) troviĝas jena rimarkigo de Kurt Kersten: "Al la tutslavismo Bakunina, al tiu revolucia tutslavismo oni komparu antaŭ ĉio: K. Marks k Fr. Engels — Kolektitaj skribaĵoj 1841—1850, III. vol., pĝ. 246/264, eld. de Fr. Mering (Mehring), Stuttgart 1913; "la demokrata tutslavismo", traktatoj en la *Nova Rejna Gazeto* (Neue Rheinische Zeitung) en februaro 1849. — Pri la Slava Kongreso k la korekto al la opiniaro de Engels komparu enkondukon de Mering pĝ. 13 ks; 76 ks; krome Marks-biografion de Mering. Pri la Slava Kongreso skribis Engels: "Nova ripeto de la Vartburg-festeno, la samaj frazoj, la sama utopiismo, la sama mizero poste: 'Ni estas konstruintaj ampleksan domon' ktp. Kiu volas legi tiun faman kanton tradukitan en slavan prozon, tiu legu la broŝuron de Bakunin." La traktatoj en la *Nova Rejna Gazeto* komenciĝis: "Bakunin estas nia amiko. Tio ne detenas nin submeti lian broŝuron al kritiko." — Steklov finas: "Bakunin provis plej intime interligi la naciajn aspirojn de la slavoj kun la revoluciaj taskoj k entute ne disigi la germanan demokratan revolucion de la slava." — K. Marks — Revolucio k Kontraŭrevolucio en Germanio (pĝ. 57 ks.): VIII poloj, ĉeĥoj k germanoj; pĝ. 59: poloj; pĝ. 61: Bohemio; pĝ. 62: tutslavismo; pĝ. 64: la Slava Kongreso. Korekto de Kaŭtski en la enkonduko pĝ. XXI. — Tre detale: Th. G. Masarik: Pri rusa histori- k religi-filozofio. Sociologiaj skizoj. Jena 1913. II, pĝ. 1—35: Karakterizo pri Bakunin; II, pĝ. 25: Pri la tutslavismo. Plie Netlaŭ (Nettlau) en "Socialistaj Monatkajeroj", pĝ. 190: Mikaelo Bakunin en la jaroj 1848/49. Pri kongreso k pentekosta ribelo; socipolitika leterinterŝanĝo. La *alvoko al la slavoj* estas tie presita sur pĝ. 290/94. Kiel kompletigon al la notoj en la Konfeso ni ankoraŭ aldonas jenan konstaton de Bakunin el pli malfruaj jaroj: "Estas vere, ke mi riskas diri, ke la detruo al la aŭstra imperio k al la prusa monarkio necesas same kiel tiu al la cara regno por la triumfo de l' demokratio; tion la germanoj neniam povis al mi pardoni, eĉ ne la socialistaj demokratoj en Germanio." — "Tutslavianoj laŭ konsidero de la germanoj estas ĉiuj slavoj, kiuj kun abomeno k kolero malakceptas la kulturon, kiun ili volas al ili aldevigi. Se tio estas la senco, kiun ili submetas al la vorto tutslaviano, ho, tiam mi estas elkore tutslaviano. Ĉar efektive ekzistas malmultaj aferoj, kiujn mi tiom malŝategas k malamas kiel la malnoblan regadon k tiun burĝecan, nobelan, burokratan, militistan k politikan kulturon de la germanoj. Mi ĉiam daŭrigos, en la nomo de la ĝenerala liberigo de la popolamasoj prediki al la slavoj la pacon, la fratecon, la solidaran agadon k organizadon kun la germana proletaro, sed ne aliel ol sur la ruinoj de tiu regado k de tiu kulturo, k por neniu alia celo ol la detruo al ĉiuj imperioj, la germanaj k la slavaj."

(Eldonkvanto 10 000 ekz.)
6-a JARO. N-o 3 MONATA ALDONO AL SENNACIULO 12. III. 1931

La Lernanto

REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris XII-e ★ ADMINISTREJO: Kolmstrato 1, Leipzig O 27

# LA MISTERO DE L' NEBULO

La knabo glitis malrapide sur la plankon apud la fenestro k dormetis. Longe li estis rigardinta kun serioza mieno trans la kontraŭflankajn domojn al tiu alta rektangula konstruo kun superstarantaj kamenegoj, en kiu laboris lia patro dek horojn ĉiutage. La ĥemi-fabriko.

Komencis noktiĝi. Sed nur malforte penetris la lumoj de l' stratlanternoj, de l' magazenaj montrofenestroj en la ĉirkaŭon. Densa nebulo invadis la stratojn, miksiĝis kun la fumo de l' kamentuboj, envolvis la fabrikan koloson k penetris malbel-flave tra la malfermita fenestro en la ĉambreton, kie kuŝis la knabo surplanke. Kaj restis malseka strio sur la fenestra kadro.



Pli vigle enpelis tiun ondantan vaporon la norda vento, kiu ekmovis la kurtenon k kaptiĝis sible en la angulo. Tamen ĝi ne tuŝis la blondan buklaron de l' knabeto, kies dekstra brako protekte levita sterniĝis pende super la mallarĝa vizaĝo. Kaj la nebulo kunportis ankaŭ de ie malproksime ne klare distingeblajn konfuzajn tonojn de muziko . . . valsan ritmon? marŝmelodion? . . . Ĝi venis de ie el la etero. "Radio-ondoj", pensis la knabo k revis. Kaj ĝi alportis iun parfumon tre dolĉan, nedireble dolĉan k narkotan, kiel siringaj floroj en printempo. Ho, strange dolĉa odoro! Estis mistera nebulo, kiu kuŝiĝis peze k silente sur la ĉambron kun la knabo, kvazaŭ fumaĵo el kamentubo eliĝinta trafas senelirejon . . .

La katino estis la unua, kiu trovis la dormanton. Ŝi lekis lian frunton, liajn genuojn k preterpasis kun mallaŭta murmuro. La knabo ridetis en songô.

Li ekvidis tra la nebulo sian fratineton, kiu ludis per pilko k gracie saltetis. Li volis mansigni al ŝi, sed ne povis. Liaj brakoj estis tiom pezaj . . . Kaj la biciklon li ekvidis, kiun li admiris en magazeno k kiun donacus al li la patro, se li sukcese trapasus la lernejan ekzamenon. Kaj tiam li sentis ree pli akre la dolĉan parfumon de l' nebulo, k liajn tempiojn komencis frapeti marteletoj. Ĉiam pli rapide, ĉiam pli insiste, pli laŭte, pli rapide . . .!

Jen li vidis tra la nebulo la patron ŝanceliĝanta — ho, venu, paĉjo, via filo atendas vin sopire. Estas tiom malfrue, tiom mallume, mi timas! Nur tie k ĉi tie fajreroj, brilaj steletoj ekŝprucas, ekbrilas, siblas, falas, k estingiĝas en la nigra nokto. La patro ŝanceliĝas, haltas, restas senmova, maldensiĝas k subite malaperas abismen, senvoĉe, fantomece.

Kaj ankoraŭ tiu vomiga odoro, kiu narkotas, tiu parfumo portata sur la nebulondoj, k ankoraŭ martelpiketoj kontraŭ la tempiojn, ŝirantaj kvazaŭ la orelojn, kiuj susuradas . . .

La infano nenion aŭdis plu. Sed jen, tra la nebulo la patrineto — lia panjo! . . . Pli rapide, venu pli rapide ĉi tien, panjo, via infano sopiras al via ĉirkaŭbrako; k li etendas la brakojn

longe, longe ... en la malplenon... Panjo, kial ci forestas de mi? Kial cia vizaĝo estas tiom pala, ciaj okuloj tiom ruĝrandaj, tiom sulkigita cia frunto, tiom displektitaj ciaj haroj?... Tiom mute malferma cia buŝo?!

La knabo ploras k baraktas k volas ekkrii, sed ĉio turniĝas. Inkubo.

Li dormas pace tie sub la fenestro, sur la planko... Sed ĉio brulas en li, k nun lia spiro fariĝas pli k pli peza, pli k pli stertora, k la odoro ne plu estas dolĉa, sed amarega, vomiga, sufoka, timegiga. Kaj la bildo de l' patrino formalaperas, disvaporiĝas ... abismen, k la nebulo fariĝas pli k pli densa k kompakta, estas ĉie, en ĉio...

Karlo kuŝas en rigido. Post horo la patro revenas k miras pri la silento... malgaja silento. Nekutima. Kie estas la edzino, kie la geknaboj? Nenia gaja bubo petole saltas je lia renkonto, nenia hela infana voĉeto pepas sian vivoĝojon al li.

Karlo! Karlo? Lian gorĝon sufokis haladzo rampanta, kiam li surpaŝis la sojlon de l' ĉambro. Li balanciĝas, sin tenas, aŭtomate retiriĝas malantaŭen. Helpu!

De tie transe, el la fabriko, kiu donis al li la panon, transvenis venena nebulo, perfide kuŝiĝis sur la ĉambran plankon, plenigis ĉiun angulon. La fabriko, kiu forkonsumis ĉiutage porcion da lia vivenergio, en kiu li produktadis artefaritajn nebulojn, al kiu li oferis sian laborforton por nutri sian familion: Tiu fabriko estis mortiginta tiun plej amatan estaĵon en lia vivo, lian fileton.

En la hospitalon oni portis la sveníntajn, gasumitajn patrinon k filinon. Nenia arto de kuracisto sukcesis revivigi la etulon, kiun sufokis la ĥemia nebulo. *Nubo.*

**FABELOJ** de Hermynia Zur Mühlen
**Kion rakontas la amikoj de Peĉjo**
**Prezo 0,60 gmk.** — 56 pĝ.
**Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

# LA GLACIIGITA LAGO

Ne dum unu tago, nek dum du aŭ tri tagoj la frosto provis senmovigi la lagon. Ĉiutage la frosto venis per malica vento k blovadis. Sed tio ne helpis, la lago daŭre fluis k ĝoje muĝis.

La frosto ne trankviliĝis: oni devas pruvi al la lago, kiu estas pli aĝa! De tago al tago ĝia kolero pli ardis, k ĝi sieĝis tiom pli la lagon per ĉiaspecaj ventoj, uraganoj k neĝoj.

Iom post iom la lago komencis rezigni. Kaj kun doloro ĝi konvinkiĝis, ke ĝi havas kontraŭ si pli fortan k pli kruelan; do tio devas okazi.

Iun matenon ĝi sentis, kvazaŭ ĝi estas tegita per ia kovraĵo, k nur tra la kovraĵo ĝi vidas la ĉielon. La sekvantan tagon ĝi fartis pli malbone, la kovraĵo plidikiĝis, pro kio la ĉielo nun estas tute barita por la okulo. La moviĝo fariĝas pli malfacila k ludi kun la ondoj estas jam tute neeble. Ĝi malfluiĝis!... Malfacile estis kutimiĝi al tiu ĉi senmoveco k ŝtonigiteco. Ĝi baraktas, ĝi volas eksalti — sed senrezulte.

Post ĉiu tago ĝi pli forte sentas la alproksimiĝantan morton, k la dikega glacio premas ĝin kvazaŭ mil ŝtonegoj.

*El juda lingvo trad. S. Guterman.*

## *VESPERE*

*Mia sun' malsupreniras.*
*Lume estas, sed aer'*
*Aliiĝis: mi enspiras*
*Malvarmeton de vesper'.*

*Jes, vespero enplektiĝas!*
*Ĝi sentigas per ventum':*
*Nokto jam alproksimiĝas,*
*Nokt' sen sono k sen lum';*

*Baldaŭ ĝi, fininte sorton,*
*Min kuŝiĝos, kiel ŝton'...*
*Sed se l' tag' deprenis forton,*
*Ĉu la nokt' ne estas bon'?*

D. Ŝutov.

# LINGVAJ NOTOJ

*Demando:* Ĉu estas korekte diri: *samloke ol, samtempe ol?*

*Respondo:* La signifo de la vorto *ol* povas esti difinata laŭ la Fundamenta Vortaro. El la tie troveblaj naciaj tradukoj de *ol* sole la franca: *que (dans une comparaison)* ebligus la uzon de *ol* post *sam-*. (Franca *de même que = same kiel; plus que = pli ol.*) Kontraŭe ekzemple nek la germana *als*, nek la angla *than*, kiuj estas montritaj en la Fundamenta Vortaro kiel tradukoj de *ol*, estas uzataj post vortoj enhavantaj la ideon de *sama*. Evidente Zamenhof celis per *com-*

*paraison* nur la komparon inter neegalaĵoj. Efektive ni trovas ĉe Zamenhof kiel ĉe aliaj imitindaj aŭtoroj la vorton *ol* preskaŭ nur post *alia, malsama, pli* k *antaŭ* en la signifo de *pli frue*. Aliflanke post *sama* ni vidas jam en la Fundamenta Ekzercaro (§ 27) la vorton *kiel* en la signifo de franca *que*, germana *wie*, angla *as* ktp.

La esprimoj *samloke* k *samtempe* estas adverboj demonstrativaj kun la signifo *en tiu* (aŭ *la*) *sama loko* k *en tiu* (aŭ *la*) *sama tempo*. Al ili nature rilatas relativa pronomo adverba, ĉu ĝenerala: *kiel*, ĉu speciala: *kie* (loke) aŭ *kiam* (tempe). Jen ekzemploj:

*Mi vekiĝis samtempe* *kiel* *Paŭlo* (aŭ kun iom alia nuanco: *samtempe kun Paŭlo*). *La detektivo retrovis la pakaĵojn samloke kiel antaŭ tri tagoj. Samtempe, kiam la internacia konferenco solene decidis malpliigon de la armado, la militministro ordonis la aĉeton de tri novaj specoj de venengasoj. Samloke, kie iam nenionfaristo estis ĝuinta lukson nemeritan, nun malriĉaj invalidoj trovis meritajn kuracon k ripozon.*

Aliaj kombinoj: *samaĝa, sammaniere, samsenca, samsignifa, samrajta, samopinia, samvoje, samkolora, samforma, samspeca, samranga, samklasa, samdistanca kiel* aŭ *kun*. —

*Akademiano d-o W. Lippmann.*

# LA FAJRAJ SIGNALOJ

(Laŭ Bobinska: Pioniroj)

*Resumo de l' antaŭaj ĉapitroj:* Tri geknaboj (Vanka, Katka, Juk), anoj de junpionira tendaro, troviĝas sur insulo en mezo de granda lago, kie ili serĉis, trovis k ree perdis forkurintan knabinon. Ili restas izolitaj, sen transportilo. Vanka k la knabino (Katka) ŝatas pli k pli ĉi tiun aventuron, dum la tria (Juk) pro la stomaka demando alsopiras elsaviĝon el tiu situacio. Por doni signalojn al la tendaro, ili starigis du grandajn ligno-ŝtiparojn.

---

Ĉiu dormis siavice; oni anstataŭis sin[1] reciproke: unu el ili estis ĉiam deĵoranto[2] por spion-atendi[3] la alvenon de la barko. Sed laŭgrade kiel alproksimiĝis la vespero, sen ke diriĝis unu vorto, kvazaŭ per silenta akordo[4], Katka k Vanka revis unu saman aferon: ne vidi alvenanta[5] barketon. Kun ia[6] kaŝita maltrankvilo ili rigardis la trembrilantajn akvojn de la lago. Kiel ili povus foriri nun? . . . estus tiel korĝojige vidi la majestan fajron el tiuj ĉi du ŝtiparoj, kies fajreroj ligiĝus[7] kun la supro de l' pinoj!

Kaj Juk?

Li atendis malgaje la alvenon de barko.

La porcioj estis multe tro malgrandaj. Eknoktiĝis. Nenia barko.

*

La lago moviĝis malforte, la plaŭdetado de ĝiaj ondoj formortis kontraŭ la bordo[8] en la nokta trankvilo. La steloj eklumis unu post la alia sur la firmamento de verda violkoloro, poste malleviĝis k movbrilis en la akvo, etendiĝantaj sur la dorsoj de l' ondoj.

La tri forlasitoj restis kaŭrantaj sur la bordo, atendante, ke noktiĝos.

— Ni ekbruligu! eksplodis Vanka.

Oni aŭdis la krakadon de l' sekaj branĉoj k post momento la du ŝtiparoj flamiĝis en fajroj grandegaj k helaj en la nokto.

La orbrilaj fajreroj rond-turniĝis[9] kiel miloj da etaj lumvermoj, la plej proksime starantaj arboj estis purpuraj per la reflekto de l' brulego, la korvoj ĝenitaj en sia dormo, forflugis kun raŭkaj krioj.

— Tion oni povas nomi flamo! ekstaziĝis Juk, tio estas alia afero ol niaj mizeraj ŝtiparetoj de la tendaro.

— Mirinde! Grandioze! ekkriis Katka, kunplektante la manojn. Oni kredus de l' bordo, ke la tuta insulo estas en flamoj[10].

Ili devas esti blindaj por ne vidi tion.

Sed la fajroj estingiĝis tiel rapide, kiel ili estis ekflamigitaj. Tiam la knaboj rapidiĝis. Katka trenis tutan arbustotufon de seka junipero, gratvundante al si la vizaĝon k la manojn. Vanka hakis k tranĉis ankoraŭ. Juk ruĝa, ŝviteganta, laboris kiom li povis.

Kaj nur kiam la ŝtiparoj denove ekflamis, la junaj falis elĉerpitaj[11] sur la herbon.

---

[1] Aŭ: unu la alian. [2] Aŭ: deĵoranta. [3] Ankaŭ: kaŝ-observi. [4] Aŭ: interkonsento. [5] Ankaŭ la infinitiva formo estas korekta post "vidi": alveni. [6] Pli akcente: kun (ia) nedifinita kaŝ(it)a maltrankvilo... [7] Aŭ: kuniĝus, interplektiĝus. [8] Pli forte: kontraŭ la bordon. La akuzativa formo ne estas necesa post "kontraŭ", ĉar la kunteksto mem jam difinas klare ĝian sencon; la akuzativo povas servi post tiu prepozicio nur por pli-akcenti la movon, doni apartan intenson al ĝi. [9] Aŭ: rond-dancis (ĉirkaŭ-turniĝis). [10] Aŭ: flamiĝinta. [11] Adjektiva formo, ĉar ĝi rilatas al la *stato* de la junaj, sed ne al la *ago* de l' falo (la verbo de l' frazo). Sekve ankaŭ: "La fruktoj falis maturaj de la arboj", sed: "La knaboj falis mole sur la sablon"; "la knabino falis dolĉe sur la kusenon"; ĉar en tiuj lastaj frazoj la ago (la falo) estas kvalifikata per la atributoj "mole", "dolĉe", k tiuj adverboj ne atribuiĝas al la subjektoj (knaboj, knabino), pri kiuj ili nenion difinas (eldiras).

# ANEKDOTOJ

**"Veturu, tiuj ne estas miaj kruroj!"**

Rusa kamparano aĉetis paron da botoj k, laŭ kelkloke en Rusio ekzistanta kutimo, decidis ĝin "surverŝi", t. e. drinki okaze de ĝia akiro. Li venis al la proksima drinkejo k tie drinkis multe da brando. Li tiom ebriiĝis, ke elirinte el la drinkejo k pluirinte kelkajn klaftojn li falis teren k ekdormis meze de la vojo.

Tiutempe alia kamparano veturis tra la loko, kie kuŝis la ebriulo. Ekvidinte lin k vidante, ke la kruroj malhelpas veturi sur la ŝoseo, li ekkriis: "He! ci tie sur la vojo!

forprenu ciajn krurojn!" Sed la ebriulo nenion aŭdis. Tiam la veturanto elĉariĝis k vekis la dormanton, kies botoj tiutempe jam estis ŝtelitaj. Vekiĝinte li rigardis la krurojn, k vidante, ke ili ne estis botvestitaj, li diris: "Veturu, tiuj ne estas miaj kruroj!"

*Esperantigis 13 794.*

---

**Malnova, sed bona historieto**

Du personoj disputadis. Tiam alvenis alia persono k komencis partopreni en la disputado. Unu el la du unuaj disputantoj sin turnis al la laste veninta persono k diris al li: "Mi volas rakonti al vi bonan, lernindan historieton. Iam mi havis amikon, kiu havis la plej belajn brunajn okulojn en la mondo. Iun tagon, kiam mi renkontis lin, liaj okuloj estis bluaj. Ĉu vi povas diveni, kiel li ricevis ilin?"

*La laste veninta persono:* ? ? ?

*La unua:* "Nu, li ŝovis sian nazon en aferojn, kiuj tute ne koncernis lin." (Proverbo: Neniam ŝovi sian nazon en fremdajn aferojn.) *(12 286)*

## KIEL MI FARIĜIS ESPERANTISTO

Mi estis librotenisto ĉe teksa firmo, kies ĉefido fervore okupis sin pri esperanto. Ankaŭ la alia librotenisto estis sperta esperantisto. Ambaŭ rakontis al mi tre multe pri esperanto. En mia proksimo ili interparolis nur esperante, por ke mi estu spronata lerni la lingvon. Mia kolego rakontis al mi travivaĵojn dum sia vojaĝo al Finlando dum somero 1924. Li vizitis esperantistojn en Vainikkala, Helsingfors, Viborg k. a. lokoj kun nura scipovo de esperanto krom sia gepatra lingvo. Preskaŭ la du junuloj sukcesis igi min lerni esperanton. Mi tamen ne kuraĝis komenci, ĉar mi jam estis 33-jara k nur scipovis mian gepatran lingvon.

Dum marto de l' jaro 1925 vizitis sinjoro Ĉe nian urbon. Iumatene li aperis en nia laborejo akompanita de l' ĉefido k salutis nin per "bonan matenon". Mi resalutis: "Guten Morgen!" Tuj li demandis min, kial mi ne parolas esperante. Ne kompreninte mi ne povis respondi. Mia kolego klarigis, ke mi ne scipovas esperanton. Kara leganto, kion vi opinias, ke sinjoro Ĉe tiam diris al mia kolego? Li denove instigis mian kolegon igi min ankaŭ ellerni esperanton. Ke kleraj homoj estus scipovantaj esperanton.

Li fakte sukcesis. Hontigite mi tiam decidis lerni la lingvon. Sekve sinjoro Ĉe estas kulpa, ke mi fariĝis esperantisto.

La sekvontan kurson (en junio 1925), kiun gvidis la ido de mia ĉefo, mi partoprenis. Ne kontentigite en la neŭtrala grupo mi poste aliĝis al la laborista grupo "Nova Tempo" en Zittaŭ, kies prezidanto mi nuntempe estas. Ano de socialdemokrata partio mi fariĝis jam en la jaro 1920. Ĉiu leganto povas kompreni, kial mi morale estis devigata transiri al la laborista movado.

*SAT-ano 9958, Zittaŭ (Saksio).*

# POR NIA DISTRO

(Ni petas kunlabori al la enigma fako, sed akceptas nur tre inteligente ellaboritajn problemojn, rebusojn ktp.)

**Solvoj el la antaŭa n-o:**

*Nom-enigmoj:* Petro/selo; Napo/leono; Niko/tino; Mario/neto; Mak/adamo; Mak/arono.

*Ŝercenigmoj:* 25. Kiam ili estas kom-etoj (kometoj). 26. Kiam ili konk-ludas (konkludas). 27. Kiam ili estas korv-etoj (korvetoj).

**Novaj nom-enigmoj**

*Trovu vortpartojn k kombinu ilin laŭ jena maniero:*

| | *Kaj vi ricevos jenon:* |
|---|---|
| 7. Edzino de ĉefa greka dio + vokalo | bravulon |
| 8. La sama di-edzino + edziĝa havaĵ-aldono | faman antikvan historiiston |
| 9. Konsonanto + plej kuraĝa greka heroo | ilon de arbaristo |
| 10. Konsonanto + virina nomo | fabelan virinkorpan monstron kun alloga voĉo |
| 11. Vokalo + konsonanto + utila insekto | virinan nomon |
| 12. Plej necesa spico + plej necesa k potenca objekto | antikvan reĝon, per kies saĝo fanfaronas religiuloj |

*T. Dajber.*

**Ŝercenigmoj**

28. Kiu kato samtempe estas muso?

29. Kiu parto de musa korpo estas ankaŭ parto de via korpo?

30. Kiam oficiala jura persono transformiĝas en belan kanton? *(1116)*

**Humoro**



*La onklo:* Vi havas malgajan mienon, Bob?

*La nevo:* Estas kaŭzo! Paĉjo maltrafis en spekulacio; li estis venkata en golfludo, li monperdis ĉe ĉevalkuro, k nunmomente li estas leganta mian kajeron kun lernaj notoj.

infanan penson, la etulan individuecon — dum ili devus helpi al la disflorado de l' infano. Kial? Ĉar oni forgesas, ke la infano, eĉ kvar aŭ kvin-jara, jam havas vivon mirige riĉ-enhavan, kiu celas al ĉiama plivastiĝo. Tiu vivo devas formi la bazon de ĉiu lerneja aktiveco, ĉar tiele la lernejo daŭrigos, plialtigos k kompletigos la familian k socian vivon.

Tion celas Pres-arto en Lernejo. Ĝi eltiras el infana sperto ĉion kapablan interesi la lernantojn; ĝi ankaŭ vekas intereson, donante al infanoj la deziron konigi sian opinion por ke ĝi estu poste presata. Tiuj redaktadoj ŝajnas kvazaŭ plibeligitaj dank' al la grav-aspekto kiun donas al ili la nova pres-prezento. Kaj tiele la trezoro ne detruiĝos — dum aliel oni forĵetas la redakt-kajerojn de niaj lernantoj: kial zorge gardi ion vekanta nenies intereson? La lernanto preskaŭ neniam rekonas en ĝi rememoron pri sia infana pasinta vivo; ĝi nenion povus fari el pure imageca redakto, el inventoj nekredeblaj.

Ĉu ne okazus aliel, se anstataŭ vort-ludo iom vana, la instruisto k knaboj povus rekoni iom da tiu tempo kune vivita, "kiam sur lipoj ĉiam estas rido, en animo — ĉiam paco"?

Pres-arto en Lernejo celas, ke ĉiu redaktu nur tion, kion li vere bezonas eldiri, ke li ĉiam povu sin rekoni en la konservata Viv-libro. Tiel la knaboj-presistoj k la instruisto ne plu timas la alvenon de tia punlaboro, kia estis "redaktado": senpacience ili nun sopiras pri ĝi.

En tiu ĉi artikolo ni ne celas konigi ĉiujn detalojn de nia metodo; tre konciza resumo sufiĉos, por ke vi mem konceptu ĝin.

La lernantoj elektas libere la redakt-objekton, kiu interesas ilin aparte: rakontoj pri sia vivo, lok-interesa okazintaĵo, revoj pri estonto, aŭditaj historioj ktp.... Neelĉerpebla estas tia minejo: ĝi estas la vivo.

Poste la infanoj legas la redakton faratan de ili; la pli junaj voĉe konigas tion, kion ili volus skribi, k la instruisto ĝin skribas laŭ korekta lingvo sur la nigra tabulo. Tion farinte, oni regule balotas por elekti la redaktaĵon, kiu havos la honoron esti presata.

La redaktinto de la elektita verko foriras poste kun la 3—4 kamaradoj el sia grupo (la lernklaso estas dividita laŭ grupoj de redaktantoj-presantoj, k la lernantoj havantaj la samajn inklinojn kune grupiĝas — aŭ ankaŭ tiuj, kiuj havas la samajn kvalitojn). La deĵoranta grupo izoliĝas en libera aero, se la vetero estas bela, aŭ en iu parto de la lernĉambro; ĝi prilaboras la redaktaĵon sur portebla tabulo.

Dum tiu laboras, la aliaj grupoj legas la viv-librojn skribitajn de iliaj korespondantoj — necesas ekscii, ke ĉiu el niaj lernejoj pres-artaj en tuta Francio estas nur parto el ok-lerneja grupo: kun tiuj korespondantaj lernejoj ni interŝanĝas presaĵojn, karakterizajn specimenojn el nia vegetaĵaro, el nia regiona grundo, el la lokaj industrioj; ankaŭ diversspecajn bildojn k gravuraĵojn — baldaŭ filmojn.

En tiaj kondiĉoj la leg-arto estas vere tia; la instruisto iras de unu lernanto al alia por doni al ĉiu la necesajn konsilojn. — Poste la deĵoranta redaktanta grupo alportas la korektitan tekston de la elektita redaktaĵo: ĉiuj infanoj partoprenas la denovan korekton, ili pridiskutas k kritikas la ortografion, la fraz-konstru-manieron. La gramatika ekzercaro de posttagmezo estos kombinita laŭ la eraroj rimarkitaj en la matena redakto-teksto.

Kiam la rakonto estas tute senerarigita, la deĵorantaj presantoj tuj liter-kombinas la tekston, dum la aliaj skribas, desegnas k legas. Helpe de sufiĉe simpla aparato jam de longe elprovata, la lernantoj presas mem la tekston en tre mallonga tempo. Ĉiu lernanto ricevas da ĝi unu ekzempleron, kiun li lokas en specialan fortan paperujon. Oni presas pliajn ekzemplerojn por la korespondantaj lernejoj. —

Tiu ĉi mallonga priskribo povas doni nur tre nesufiĉan koncepton pri la nova horizonto kiun ni ŝuldas al ĉi tiu tekniko: ĝi estas radika renovigo de la instru-sistemo pri lingvo k geografio. Oni preskaŭ povas certigi, ke la gramatiko ne plu ekzistas kiel memstara lern-objekto: por enplanti en la cerbo korektajn frazformojn, ni opinias, ke tre aktiva praktiko k uzado de la lingvo estas plej efikopova.

Pri la komprenema legado, ni povas certigi, ke nur Pres-arto en Lernejo sukcesas veki ĉe infano egan intereson, ĉar ĝi kunigas k unuigas vivon k edukadon. La infano legas tekstojn plaĉantajn al ĝi, komprenatajn de ĝi, ĉar ili estas verkoj de ĝiaj kamaradoj-lernantoj — ili estas redaktataj en lingvo de ĝi bonege konata — do tiaj verkoj adaptiĝas al ĝia infana menso. Kial do ni konservus naŭzajn metodojn ŝajne "ŝparantaj tempon", k kial vi poste miras pro tio ke "la lernantoj legas kun nenia komprenemo"?

Ni finas ĉi tiun certe nekompletan studon, kvankam ni dezirus elmontri la entuziasmon de la infanoj, la kreskantan simpation de la gepatroj iom post iom konvinkataj, k ankaŭ, en iaj regionoj, la simpation k la kuraĝigojn malavare montritajn de kelkaj lernej-inspektoroj. Tio certe rekvietigos la hezitemulojn, la valorajn instruistojn "klinantaj la kapon dekstren k maldekstren", k elmontrantaj ioman nekredemon.

Kaj ni estas tiom konvinko-plenaj pri la alt-eduka valoro de nia nova tekniko nun revoluciiganta la modernan pedagogion, ke ni ne povas fari aliel ol entuziasme ĝin propagandi. Gek-doj de la tuta mondo interesataj per tiu ĉi senpretenda studo,

---

Francisko Mering mem en la Marks-biografio (pĝ. 413) skribas: "Cetere Engels eraris: la slavaj popoloj de Aŭstrio tamen havis la historian estonton, kiun Engels al ili kontestis." — Resume ni rajtas jenon diri: Marks k Engels malpravis kontestante por ĉiam al la etaj slavaj grupoj ĉian eblon je ŝtata sendependeco. La mondmilito malfavore al ili decidis rilate al la nacieca problemo. Aŭstrio pereis spite Marks k Engels. Sed por la progreso de la revolucia movado la sendependeco de la slavaj etŝtatoj signifis plejan malutilon — amara ironio de la mondhistorio: ĉeĥaj legioj provis en Rusio renversi la ŝtaton de la proletaro; la slavaj etŝtatoj estas ŝtono en la ludo de la eŭropa reakcio kontraŭ la revolucio; sole, ili estas hodiaŭ ne plu apogoj al Ruslando, sed baraĵoj de la reakciaj okcidentaj ŝtatoj. Do la liberigo de la subpremitaj nacioj efikis kvazaŭ malhelpo al la revolucio; k esence Marks k Engels fine tamen pravis.

Pasis preskaŭ cent jaroj, de kiam Bakunin tiom arde agadis por detrui la imperiojn Aŭstrio-Hungario, Germanio, Cario. En ilia detruo li vidis "triumfon de la demokratio". La imperioj detruiĝis en 1917 k 1918. Sed la triumfo? Pli versimilas, ke li celis detrui ĉian ŝtaton! Ĉar li bone antaŭsentis, ke tute egalas, kiu grupo en ŝtato gvidas, la aliaj grupoj sin sentos subpremitaj k celos liberiĝon. Trafegan ekzemplon donas nuna *Ĉeĥoslovakio!* Liberaj federacioj, maturigo de la popolo klerigenda! Jen liaj postuloj. Mirinde, nenia mencio pri ekonomia bazo materialisma troviĝas en la libro. Estas idealisma liberigbatala tendenco de la slavaj gentoj k raso. Kaj ankoraŭ nuntempe tiu problemo estas nesolvita.

---

## Ĉiuj kunhelpu!

**Ni konatigos nian movadon k la rifon ni evitos, se ni ofte en la nacilingva gazetaro de la laboristoj, aperigos tekston pri SAT k "S-ulo". Ĝian bonegan enhavon ni multe nacilingvigu.** *G. Reno (Renaud) (16 461).*

---

**KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"**

# KIAL SENLABORECO?

Responde al K-do 6707 (vd. n-on 328) mi diru, ke ni ne bezonas senlaborecon, ĝi ankaŭ ne estas necesa. Se ni volus, ni ĉiuj kune povus forigi tiun ĉi malindan ekonomian krizon, kiu estas artefarita de la entreprenistoj en la tuta mondo. Ni estas internacie organizitaj en la II-a aŭ III-a Internacio. Kunigu ni niajn fortojn en unueca fronto kontraŭ nian komunan malamikon, la kapitalismon, kiu ne povos nin kontraŭstari. Unue ni realigu la devizon, ke "la mondo estu patrio de l' laboristaro tutmonda", estu ekonomia tuto. Ni forigu landojn, doganojn k limimpostojn. Ni enkonduku liberan var-interŝanĝon, leĝajn varprezojn. Ni enkonduku en tuta mondo 4-horan labortagon per ses dumtagaj alternoj, responde al la teknika progreso. Ni senŝarĝigu ĉiujn laborulojn de l' nuntempa troŝarĝo; k forigu ĉiun popece pagatan laboron. Ĉiu laboristo devas priservi nur unu maŝinon.* Estu for nebezonataj, senutilaj direktoroj-laborgvidistoj-inĝenieroj, k al tiuj, kiuj restas, ni malaltigu la salajrojn ĝis la nivelo de plenaĝa laboristo. Ni forigu la sistemon de tantiem- aŭ premipagoj, enkonduku minimumon k maksimumon de pagotaj salajroj, forigu ĉiujn privatajn mon-instituciojn k starigu nur ŝtatajn bankojn, enkonduku egalan monvaluton sur tuta mondo, nuligu ĉiun privatprofiton k procenteg-rentumojn. Enkonduku asekuron por ĉiu unuopulo, por ke li ne bezonu timi pri siaj viv-bezonaĵoj. Certe ĉion tion enkondukante ni tuj forigos la nunan ekonomian krizon tutmondan k de ĝi rezultantan senlaborecon.

Se tion ni ne faras, estas senutile diskuti: tial ke ĉiuj regantoj nuntempaj ne volas aŭdi pri mallongigo de labortempo eĉ malaltgrade, tiom kiom la teknika progreso permesos, nek ion pri plenumo de l' suprenomitaj postuloj k pri transformo de l' privatkapitalista senplana produktado en socialisman komunan produktometodon. Tial ankaŭ, ke homoj estas kiel sovaĝaj bestoj: uzurpuloj, sinjoroj, regantoj, estroj. Tial nia diskutado

*estas nun via tasko* ekrilati kun ni; tiel ni plene interkompreniĝos k same kiel ni vi povos uzi la novan teknikon.

*H. Burginjon* (Bourguignon).

*Postnoto.* Ni firme esperas, ke niaj Gek-doj-instruistoj el la tuta mondo tre atentos tiun alvokon. Por vi, avangarda edukisto, nia iniciativo havas duoblan valoron: unue ni estas nov-spiritaj edukistoj celantaj la kreon de nova homaro — k por plilarĝigi nian *interurban* korespondadon nunan ĝis *internacia korespondado de ge-instruistoj k lernantoj, ni jam uzas k ĉiam pli uzos esp-on.* Sendu ĉion al K-do *H. Bourguignon,* instruisto en *Signes* (Var-Francio).

ankaŭ ne helpos multe al forigo aŭ malfortigo de l' nuna senlaboreco. Cetere ne ĉiuj volas kunhelpi pri tiu forigo; ili ne vere konscias pri la Marksa devizo pri l' unuiĝo de l' tutmondaj proletoj, k anstataŭ unuiĝi niaj multaj lab. gvidantoj disiriĝas nin k ni fariĝas "internacie organizitaj nuloj", kiuj tial sendefende subiĝas al ĉiuj politik-ekonomiaj uzurpuloj, kulpaj pri la nuna krizo.

Jes, fortuloj venkas, malfortuloj pagadas; ni nur volu por ke ŝanĝiĝu nia malbeninda sorto.

*Senlaborulo Knourek (2474).*

*

La unua germania regna prezidinto, Ebert, diris: "Unue demokratigi, poste socialigi." Nun oni jam demokratigis ekde 1919 en Germanio; finfine oni estos preta k ĉesos. Pri socialigo mi volas tute silenti: oni faras abstraktajn eksperimentojn, kiuj ne trankviligas la amason. Kaj oni rigardu la rezultojn de l' lastaj germaniaj elektoj; tamen eble la lab. partiojn ĝi kontentigas, ĉar ne estis perditaj voĉoj por la parlamento. Kaj la rezulto de l' politiko — ĉu ĝi estas vere bona? Se K-do Vildebrand diras en "Arb. Esperantist" (n-o 1): "Trompulo aŭ ignoranto estas tiu, kiu asertas, ke politikaj, ekonomiaj k kulturaj demandoj estas tute diversaj aferoj; la diferencigo nur celas malfortigi la forton de l' proletaro!" mi volus rimarkigi, ke politiko estas arto ne lernebla nek instruebla; ĝi estas kvazaŭ tio, kio estas animo por homo. Homo sen animo, k ideo sen politiko apartenas al la estinto. Tamen supraj tri kampoj estas diversaj; homa korpo povas esti bela k ne bona, k animo bona k ne bela. Proksimume tiel estas ankaŭ pri politiko k ideo. Laŭ tiu supozo K-do 6707 verŝajne diras, ke li trovis la vojon por unuiĝo inter komunistoj, socialistoj k senpartiuloj, kio sonas hodiaŭ kiel fabelo el sorĉlando. Sed kiu tiel bone serĉadas pri la kaŭzoj de l' senlaboreco, prezentas la disvolviĝon de l' tekniko, de l' mon- k rento-sistemo reganta, tiu ankaŭ certe argumentos bone pri la sola celo al bonstato. K-do 6707 pli detaligu sian teorion k ni Gek-doj elektu, kion ni bezonas pli necese, ĉu liberon k fratecon, aŭ la pugnon sur la dorson!? Ni elektu.

*O. B. (16 356)*[1].

*

En Zuriko (Zürich), Svisio, okazis konferenco por diskutadi tiun vastegan krizproblemon. Vidu la ruĝan revuon de la svisa sindikataro. Raciigo, proporcio inter agrara k industria krizo, doganpolitiko. Kontraŭrimedoj: malplialtigo de la laborsemajno ĝis 40 horoj. Plialtigo de la salajroj vigligas la aĉetpovon.

Laŭ mia opinio plej kulpa estas la senutila mondmilito 1914—1918. La venkintoj devas pagi tiel egajn impostojn kiel la venkitoj. La etŝparuloj malaperis. Grandskale la virinoj anstataŭas devige la virojn en la laborejoj k la pensmaniero funde aliiĝis.

*G. Reno (Renaud) (16 461).*

[1] La redakcio koncizigis tiun ĉi k ankaŭ la antaŭan artikolon.

# LA KURAĜO

*Malbenita estas la homaro, se por doni pruvon pri kuraĝo, ĝi estas kondamnita mortigi eterne. La kuraĝo, hodiaŭ, ne estas teni super la mondo la malhelan nubegon de la Milito, teruran nubegon, sed dormantan, pri kiu oni ĉiam povas esperi, ke ĝi diskrevos sur aliajn ol sur onin. La kuraĝo ne estas lasi en la manoj de l' perforto la solvon de la konfliktoj, kiujn solvi povas la racio; tial ke la kuraĝo estas la ekzaltiĝo de l' homo, k tia laso estas ĝia rezigniĝo. La kuraĝo, la ĉiuhora kuraĝo, ĝi estas sencede elteni la afliktojn el ĉiu speco, la korpajn k moralajn, kiujn malavaras la vivo. La kuraĝo, ĝi estas ŝirmi sian volon kontraŭ la influo de hazardaj impresoj k fortoj; ĝi estas gardi en la neeviteblaj tediĝoj la kutimon de laborado k agado. La kuraĝo en la senlima malordo de la vivo, kiu logas nin el ĉiuj flankoj, ĝi estas elekti metion k ĝin bone praktiki, kia ajn ĝi estu; ĝi estas ne malkuraĝiĝi pro zorgpostula aŭ teda detalo; ĝi estas fariĝi, tiom, kiom oni povas, perfekta teknikisto; ĝi estas akcepti k kompreni tiun leĝon de la specialiĝo de l' laboro, kiu estas la kondiĉo de la utila ago, k tamen rezervi al sia vidpovo, al sia spirito kelkajn ekrigardojn al la vasta mondo k pli vastajn perspektivojn. La kuraĝo, ĝi estas samtempe esti, k kia ajn estu la metio, praktikisto k filozofo. La kuraĝo, ĝi estas, kompreni sian propran vivon, ĝin precizigi, pliprofundigi, ĝin starigi k tamen adapti al la ĝenerala vivo. La kuraĝo, ĝi estas zorge observi sian ŝpin- aŭ teksmaŝinon, por ke neniu fadeno rompiĝu, k tamen prepari pli vastan k*

Kiu ne taksus ŝate la literaturan talenton de LEO TOLSTOJ?
Aĉetu la ĵus aperintan tradukon de lia
**Kristanismo kaj Patriotismo**
Trad. I. Maĉernis.
112 paĝoj. Form. 11×14 cm.
"Biblioteko de Sennaciulo"
**Prezo: 1.20 mk. g.**
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

*fratecan sociordon, en kiu la maŝino estos la komuna servantino de la liberigitaj laboristoj. La kuraĝo, ĝi estas akcepti la novajn kondiĉojn, kiujn la vivo faras al la scienco k al la arto, saluti, esplori la preskaŭ senliman multflankecon de la faktoj k de la detaloj, k tamen lumigi tiun grandegan k konfuzan realaĵon per sintezaj ideoj, ĝin organizi k suprenlevi per la sankta belo de la formoj k de la ritmoj. La kuraĝo, ĝi estas superregi siajn proprajn kulpojn, pro ili suferi, sed ne esti per ili subpremata, k daŭrigi sian vojon. La kuraĝo, ĝi estas ami la vivon k rigardi la morton kun trankvilo; ĝi estas marŝi al la idealo k kompreni la realon; ĝi estas agi k sin doni al grandaj aferoj, ne sciante kian rekompencon rezervas al nia penado la profunda universo, nek ĉu ĝi rezervas rekompencon. La kuraĝo, ĝi estas serĉi la veron k ĝin eldiri; ĝi estas ne toleri la leĝon de la triumfanta mensogo, kiu pasas, k per nia animo, per nia buŝo k niaj manoj neniel partopreni al la stultaj aplaŭdoj aŭ al la fanatikaj fikrioj.*

*Johano Jores* (Jaurès).

El la franca tradukis *Herezulo.*

# TRA ESPERANTIO

## ★ XI. Kongreso de SAT en Amsterdam (Nederl.)

2.–7. aŭgusto 1931.

### 2. Komuniko

**Loĝado.** Ni sukcesis trovi taŭgan amas-loĝejon, en kiu povos dormi 200 K-doj. Ejo k litoj estas puraj. La tranokto kostas tie por semajno (de sabato ĝis sabato) 2 guldenojn. Tiuj, kiuj volas profiti tiun unikan okazon, sciigu baldaŭ pri tio. Petoj, kiuj alvenos post la 20. junio, ne estas validaj (tiu ejo apartenas al la komunumo, pro tio la templimigo). Ankaŭ en ĝi estas havebla malmultekosta matenmanĝo. — *Hotelĉambro* unupersona kostas proksimume (kun matenmanĝo) por nokto 2,50 guld.

**Aliĝoj.** Tiuj, kiuj ne povos ĉeesti la Kongreson, estas petataj tamen aliĝi *subtene* por iom plifaciligi la preparlaborojn.

**Kovertojn** bonkvalitajn kun propaganda teksto k bela bildo ni liveras por jena modesta prezo: 100 pecoj por 75 cendoj, 50 por 40 cendoj, 25 por 25 cendoj.

*Tiuj K-doj, kiuj deziras sukcesigi nian laboron, tuj aliĝu k mendu kongreskovertojn! Kongresadreso:* J. W. J. Benjamin, Rhijnvis Feithstr. 5 A III, Amsterdam (West).

## POR EVITI LA ▲ RIFON

**8. LISTO:**

Smith (11 883), London, *ŝil. 9/6*
14 335 (Wien) 1.77 mk. g.
(17 011) Rotterdam, 1.20 mk. g.
Esp. Lab. Grupo Bruselo, 71,10 fr. fr.
Labor. Grupo St. Denis, 20 fr. fr.
174 k 913 (Lajpcig), 2.95 mk. g.
11 846 (Göteborg), 4.65 mk. g.
Habert (Sucy), 30 fr. fr.
Lefebvre (Viroflay), 18 fr. fr.

## Atentigo

**Kiel jam dirite en la n-o 335 de "S-ulo" ni prokrastis la ĝeneralan voĉdonon pri la du proponoj akceptitaj ĉe la Londona Kongreso por lasi al la opozicio la tempon aranĝi laŭstatute la okazigon de voĉdono pri plia propono koncerne al fido aŭ malfido al la nuna estraro de SAT. Tiun laŭstatutan vojon la opozicio ne sekvis (La kaŭzo estas facile komprenebla!).**

**Ne havante plu motivon por prokrastigi la voĉdonon, al la aktivaj SAT-anoj estas do sendata kun ĉi tiu n-o la voĉdonilo, kiun ili resendu kiel eble plej baldaŭ al la Administrejo en Lajpcig.**

**Ĉi-okaze ni rimarkigu, ke la opoziciuloj plej krude mensogas, kiam ili asertas, ke en Londono estas decidite, ke devas okazi ĝenerala voĉdonado pri "la malfido al la nunaj gvidinstancoj de SAT". Ĉiuj ĉeestintoj ja povas mem konstati la mensogon.**

**Direkcio.**

## Pri iu "refuto"

Reteni la monon de SAT en Moskvo k meti la asocion ĉe la rando de l' bankroto estas ja malhonesta ago. Sed ne malpli malhonesta estas la faro de iu, kiu tute konscie prezentas false, karikature la ideojn, kiujn li ne povas honeste refuti. Tiel okazis lastatempe per la plumo de iu anonimulo en "Der Arbeiter-Esperantist", la organo de GLEA. Kaj tia ago estas tiom pli kondamninda, ke la tuta distordado k misprezento de l' ideoj estas farita en nacia lingvo por tiel influi la plej grandan parton da legantoj, kiuj nur balbutas esp-on k ne povas legi kompreneble la originalan verkon kritikatan.

Temas pri "La Laborista Esperantismo" de K-do Lanti. Ĉu ne estas vere mirige, ke por "refuti" tiun broŝuron, kiu estis antaŭ du jaroj favore recenzita de ĉiuj senescepte laboristaj gazetoj, k kies anglan tradukon prenis sur sin eldoni la marksisma eldonejo de l' Nacia Konsilantaro de Labor-Kolegioj, kiun laŭdis ortodoksaj komunistoj kiel K-do Bubu k. a., — nun la GLEA-organo devas dungi fiskribiston, kiu plenumas sian taskon per du longegaj artikoloj en du sinsekvaj n-oj?

Sed eble Lanti iel pravas, konsiderante la "refuton" tute malinda je respondo. Tamen mi ne povas deteni min averti la K-dojn pri tiu mallojala kritiko k pravigi mian diron per kelkaj rimarkigoj:

1. Tute mallojale *Nikvo* (la skribinto de l' "refuto") *ŝajnigas* nekompreni la signifon de l' citsignoj, kiujn Lanti metis parolante pri "subpremataj landoj" (pĝ. 28 de l' broŝuro), nomante inter ili Georgion. De sennaciisma vidpunkto cetere la diro pri nacie subpremataj landoj havas nenian signifon. Tamen internaciistoj (la anoj de l' II-a Internacio) konsideris k konsideras ankoraŭ Georgion kiel subprematan landon, same kiel anoj de la III-a Internacio konsideras Nikaragvon, Hindion ktp. kiel subprematajn landojn. Nikvo certe tre bone komprenis la citsignan signifon k sekve prezentas tre jezuite la aferon, kvazaŭ Lanti mem asertis, ke Georgio estas subpremata.

2. Signifas plej konscie trompi la legantojn, aserti, ke Lanti forlasas la klasbatalon; ĉar li ĝuste argumentis en "La Lab. Esp.", ke *nur la klasbatalo* — ne la nacibatalo — povas liberigi la proletojn. Sed samtempe li atentigas (p. 30), ke tio nur estas vidpunkto de la en SAT ekzistanta sennaciista tendenco, sed ke "oficiale, statute SAT konfesas sennaciecon en sia organizformo, sed ne sennaciismon kiel socipolitikan teorion". Oni eĉ formale ne rajtas aserti, ke Lanti apartenas al tiu tendenco.

3. Nikvo tute bone scias, ke estas fakto la malamika sinteno de plej multaj lab. gvidantoj (ĉu konscia, ĉu parte eble nekonscia) rilate al esperanto. Tamen li opinias necese ŝirmi tiujn gvidantojn k riproĉi al Lanti "sentaktecon", tial ke li konstatis fakton!

4. Nikvo estas furioza, ĉar Lanti antaŭvidas konklude al sia argumentado pri iom-post-ioma sintrudo de esp-o kiel kulturlingvo, "ke la rolo de

M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12

### POR LA KONSERVO DE SAT

Sub la sama titolo ni notis en n-o 333 plurajn rezoluciojn ricevitajn de SAT-rondoj, kiuj kondamnas la agadon de l' opozicio en SAT. Pri rezolucio el Lajpcig ni faris piednotan rimarkon por klarigi la tiean konfuzan staton, kiu ja necesigis regule kunvokitan kunvenon de ĉiuj aktivaj SAT-anoj en tiu urbo. Ĉi tiu okazis la 25-an de februaro; en ĝi partoprenis 34 aktivaj membroj (krome 8 gastoj, inter kiuj la gvidanto de EKRELO, W. Kampfrad, kiu post protesto kontraŭ la tagordo forlasis, *sola*, la kunvenon). 31 K-doj el 34 subskribis *rezolucion*, esprimanta malkonsenton pri la agado de l' tielnomata opozicio en SAT k "sian indignon, ke aro da nedisciplinitaj k partidogme blindigitaj K-doj miskreditigas la altan valoron de kritikado per maniero mallojala k mensoga". Pro la lastaj elpaŝoj de l' opozicio la subskribintoj postulas eksigi el SAT tiujn K-dojn, kiuj per sia batalo kontraŭ la fundamento de SAT celas ĝian detruon. La 3 K-doj, kiuj ial sin detenis subskribi la rezolucion, deklaris ne principe ĝin kontraŭi.

Laŭ la alvoko, kiun faris K-do H. Vagner (Stutgart) en la n-o 329 de "S-ulo", tiu K-do ricevis ankoraŭ multajn subskribojn, kiujn citi ĉi tie forprenus tro da loko.

En la venonta n-o estos publikigataj decidoj, kiuj metos baron al la detrua agado de la subfosantoj.

---

**Atentigo! K-doj metu sur siaj leteroj al la Redakcio ĉiam siajn nomon k adreson!**

## TRA LA MOVADO

### KRONIKO

*ĈINIO.* La ĉirkaŭmonda biciklisto k SAT-ano K-do Perer (Peraire) alvenis en Kanton, kie li akceptis la proponon de l' tieaj K-doj organizi la lokan esp. movadon laŭ la spertoj dumvojaĝe akiritaj de li. *GERMANIO. Chemnitz.* Soc. esp. grupo en kunveno de 19. 2. akceptis raporton pri 4 novaj kursoj, krome 1 perletera k 2 kursoj por progresintoj. Rilatoj al soc. partio k loka ĵurnalo bonaj. Entute la juna (pro eksiĝo el LEA fondita) grupo rikoltis bonajn sukcesojn. La malnova estraro reelektiĝis. Estro: K-do Bennewitz (2378); ankaŭ la ceteraj estraranoj estas senescepte SAT-anoj. Distrikta renkontiĝo de grupoj k izoluloj eksiĝintaj el GLEA okazos en printempo. Kunveno de ĉiuj Kemnicaj SAT-anoj je 14. 3. en "Beckerbrücke" (3018)). *Lajpcig.* En kunveno de 25. febr. la *aktivaj* SAT-anoj elektis kiel Perantojn K-dojn Siedentopf k Wendt, k Administracian Komisionon el K-doj Siedentopf, Wendt k Bönisch. Ekde 11. marto la SAT-anoj kunvenos regule la duan merkredon de ĉiu monato en Popoldomo. Simpatiantoj ankaŭ estas bonvenaj en tiuj kunvenoj, kiuj havas klerigan k lingvoperfektigan taskon. (2518.) *HUNGARIO.* En Budapest komenciĝis kurso por estontaj kursgvidantoj (kiun gvidas 4 K-doj). K-do Szilagyi ellaboris lernilon laŭ rekta metodo, kiu estas elprovata en supra kurso. ("Antaŭen".) *336.*

## KORESPONDADO

### AŬSTRIO

K-do Hans Scherleitner, seruristo, *Zeltweg Nr. 44,* pri laborricevo en USSR.

### BRITIO

— Klaskonscia laboristo (29 j.) serĉas vivkamaradinon. Skribu al: K-do Solulo, Poste restante, *Beford.*

### BULGARIO

— LEA-sekcio arangâs la 25. 3. 1931 letervesperon por 4 kursoj. Ataku nin per L, PI, esp-aĵoj. Adr.: K-do T. Ajolov, 11. August, 6, *Plovdiv.*

### FRANCIO

K-do R. Viller, Peupliers, 15, *Bobigny,* Seine, L, PK, PM, kĉl. Resp. garantiata.

K-do R. Batteux, *Sains-Richaumont* (Aisne), koresp. kun Azio, Afriko, Ameriko, Oceanio, USSR, Grekio, Rumanio, Latvio, Litovio, Saarl., PI, PM.

### GERMANIO

K-do Max Wiedemuth, *N.-Oderwitz/Sa.,* Nr. 137 c, PM, kĉl, interŝ. amaskomercaĵojn.

— Kelkaj SEA-anoj koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata. Adr.: Alfred Lippert, Dornblüthstr. 27/III, *Dresden-A. 21.*

— 13 jara knabo koresp. kĉl-aj geknaboj, L. Adr.: Karl Priebisch, Petzoldstr. 3, *Sebnitz/Sa.*

— Mi serĉas inteligentan k perfektan K-don, kiu volas vojaĝi kun mi eksterlanden. Skribu al: K-do Paul Schürer, Hauptstr. 40 B, *Frankenhausen/Pleisse.*

K-do O. Wettig, *Gelnhausen b. Frankfurt,* dez. koresp. kĉl, pri la revolucioj en Hindio, Irlando, Ĉinio, Rusio ktp. k pri la rev. metodoj aplikitaj en ili. Resp. garantiata.

### HUNGARIO

— 14 Gek-doj (komencantoj) koresp. pri ĉio, kĉl, L, PK, PI. Adr.: Galfi Sandor, Grf. Szechenyi ucca 39, *Csongrad.*

### SAARLANDO

— Esp. rondeto dez. koresp. kĉl, L, PK, PI, PM. Resp. nepre garantiata. Adr.: L. Weidmann, Bruchstr. 12, *St. Ingbert.*

### SOVETIO

— 23 jara laborist-gvidanto serĉas viglan koresp-adon kĉl, pri ĉ. temoj, pref. pri politiko. Certe resp. Adr.: K-do J. Matveenko, Ĉapajevskaja 71/3, *Samara.*

### SVEDIO

K-do Ernst Lord, Norrgatan, 5, *Varberg,* viglan koresp-adon kĉl. Resp. garantiata.

**Letervesperon** arangôs la esp. grupo en Slöinge la 5-an de aprilo. Sendu L, PK, il. gaz. ktp. Ni certe resp.! Adr.: "Esperantista Grupo", *Slöinge.*

---

la LEA pli k pli tendencos malgraviĝi, ĝis ili fariĝos tute superfluaj". Estas por li okazo kondamni la nunan interligon inter LEA k SAT reguligitan en 1928 per la Gotenburga Konvencio, kiu funkcias bonorde ĉie, kie ekzistas por tio la bona volo. Nikvo ree rifuĝas al malverajo por pravigi la nepravigeblan konduton de GLEA-k SEU-estraroj, kiuj rompis la al ili ne plu oportunan konvencion, pretekste, ke "S-ulo" ne donas spacon por oficialaj sciigoj de la LEA! Sufiĉas trafoliumi la kolekton de "S-ulo" por konstati la malon.

Ne necesas elmontri aliajn ekzemplojn pri la mallojala kritiko de Nikvo, por pruvi al la legantoj, ke temas nur pri nova ĉenero en la ĉeno el atakoj, kiuj devas servi por subfosi la aŭtoritaton de K-do Lanti. Tamen la kontrasto efikas tiom pli akre, se oni komparas la eldirojn de l' ideaj fratoj de Nikvo antaŭ 2—3 jaroj pri la sama broŝuro. Tiutempe K-do Bubu laŭdis ĝin kiel "plej klaran propagandilon". K-do Nekrasov leginte la manuskripton "trovis nenion ŝanĝinda, eĉ ne komon", k K-do Demidjuk parolis en Lajpcig (vd. protok. de 9-a SAT-Kongr., n-o 256, p. 494): "La 'Lab. Espismo' estas ĝuste tiel verkita, kiel povus aspekti nia programo. Per simplaj frazoj estas klarigita la strukturo de SAT. Pro tio ni devas laŭdi la broŝuron . . ." Kaj li nur trovis nebona la 5-an ĉapitron, pri kies *neoficiala* karaktero speciale atentigis la aŭtoro. Sed tiutempe oni ankoraŭ ne akceptis la "klaran linion" kontraŭ SAT. Hodiaŭ la tuta "argumentado" en GLEA-organo k. a. similaj, servantaj al la subfosantoj, la tuta blufo pri protest-agoj ktp., devas helpi pravigi la skismigon.

Tiuj manovroj tamen ne erarigos sincerajn SAT-anojn, kiuj ne bezonas klariganton el la speco de Nikvo por formi al si opinion pri la broŝuro de K-do Lanti, k kiuj ĝin mem trastudos k rekomendos ĝian legadon al siaj konatoj. *N. B.*

---

**Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo"**


### Esperantista Tendaro

13 km. de Nice. Vivo sub tendoj. Suno tutan jaron. Plena pensiono en tendo de 4 mk. g. Spec. prezo por karavanoj. Ekskursoj, nekare: Alpoj, Monte Carlo, Italio ktp. Skribu al: K-do Yelland, ASPREMONT apud Nice (Francio).


### ATENTU!

Grupo Duisburg-Meiderich dez. koresp. kun a. grupoj k membroj pri ĉ. temoj. Koresp-ado kun Ĉinio, Hindio, Japanio, Ameriko, Francio, Anglio k Hispanio estas preferata. Adr.: K-do Matth. Trauden, Düppelstr. 34, *Duisburg-Meiderich* (Germ.).

## ENHAVO


| | pago |
|---|---|
| **Kion mi ne komprenas** | **185—86** |
| **La ekonomia krizo k la laboristaro** | **186** |
| **Grenfabrikoj en socialisma konstruado** | **186—87** |
| **La klasbatalo tra la mondo** | **187—88** |
| **Ni enkonduku la vivon en lernejo per la presarto** | **188—89** |
| **Pri la konfeso de Mikaelo Bakunin** | **188—89** |
| **Kial senlaboreco?** | **190** |
| **La kuraĝo** | **190—91** |
| **Tra Esperantio** | **191—92** |
| **Korespondado** | **192** |


Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)